



2* 1991*143

STARTO

ORGANO DE ĈĤA ESPERANTO-ASOCIO



Jan Neruda (1834 – 1891)

Jan Neruda :

Balado Maja

Akvon hejtas en kaldrono
vigla, zorga de angoro
belulino najadforma.
En kaldrono akvo ŝtorma
brulajn kraĉojn pluve ŝputas,
la bubino gapas ŝaŭmon,
akvo gluglas, biblas, ŝuŝas,
kvazaŭ griloj ĉirp-disputas,
kvazaŭ muŝoj zumas svarmon,
kvazaŭ buboj ĉaron puŝas.

Noktomezo. Ŝi genuas,
ringon haste defingrigas,
ĵetas ĝin en bolan sinon.
"Sankta virga Petronila!
Per majnokta borĉa forto
regas vi pri nia sorto,
agante laŭ volo via -
faru, faru min edzino!
Certé ĉian edzon junan
prenas mi el via mano -
sed ne prenu ĝin ĉikano,
virgulino, mi ne ŝpitas,
sanktan volon ne incitas:
nur ne donu hare rufian!"

Elkadrone vaporfumo.
La bubino alkliniĝas,
sonorvoĉoj ĉarme riĉas
kvazaŭ el de malproksimoj.
"Belulino, esperadon!
Ĉar vi ŝatas en preĝejo
kanti 'Ave' kiel feo,
mi donacus kamaradon,
sed problemo - doni kiun?
En vilaĝo edzas ĉiu,
restis sole ĉasistfilo,
vulpe rufia malriĉulo,
la okuloj vulpe grizas,
kerpon svelto paralizas
kaj eĉ ..."

"Do, donacu tiun!"

Balado paradiza

Dipatrino tra ĉielo
promenis kun bela celo,
renkontitoj genufleksis,
"Estu sana!" riverencis.
Nur la sankta Eliz'beta
ne genuis, ne salutis;
Maria kun ŝi diskutis.
"Diru al mi, kiaj zorgoj?
Vi aspektas kaduketa,
aŭreolo falopreta,
movoĵ pigraj, buŝ' oceda,
martireco en okulo -
ĉu vin ŝenas la ĉielo?"
Sanktulino riproĉetoz
acidante: "Dio kara,
tedas min enu' amara!"
"Tedas vin enu' amara!
Patroninoj siajn homojn
flegas, vartas kiel gemojn -
kiun mi konfidis al vi?"
La sanktaj lipoj mielaj
tristis: "Edzinojn fidelajn!
Kvincent jarojn mi patronas,
berĉas, strebas laŭ kutimo:
ĝis nun restas sen animo.
Unu fojon venis famo,
ke ie en Bohemio
vivas pura anĝelino:
sed kiam mi flugis teren
por protekti ŝian virton -
jam fidelon rompis flirto!"

(trad. M. Malovec)



Jan Neruda kaj la internaciaj lingvoj

Jam cent jaroj pasis post la morto de la granda ĉeĥa poeto, verkisto kaj ĵurnalisto Jan Neruda. Li naskiĝis en Prago la 9-an de julio 1834 kaj tie li ankaŭ mortis la 22-an de aŭgusto 1891. Li estis vera fondinto de la moderna ĉeĥa poemarto. Kiel profesia ĵurnalisto li famiĝis per siaj vari-temaj kaj humurplenaj felietonoj kaj vojaĝpriskribaj eseoj, krome li estis sprita kaj sperta literatura kaj teatra kritikisto. Ankaŭ li estis rekonata fondinto de realisma ĝenra novelo pri la vivo de simplaj urbanoj. La diversaj scioj de Neruda estis vastaj, li verkis pri la literaturo, teatro, muziko, natursciencoj ktp. En majo 1891, do nur tri monatojn antaŭ lia morto, aperis lia felietono kun demandforma titolo: "Ĉu iu entute povas inventi ian lingvon?". En la facilflua, humurtona kaj iom moka teksto troviĝas konstatoj, montrantaj la bonan informitecon de la aŭtoro pri la temo:

"Homoj nun ekdecidis, ke ni havos unusolan "mondlingvon", kiun en la mondo komprenos ĉiu, kiun parolos ĉiu, kaj efektive: jam nun ni havas tiom da "mondlingvoj" - dudek, aŭ ĉu ili estas tridek? Ili evarmas ...

S-ro Schleyer, paroĥestro el Lizzeŝteten ce Konstanz, vojaĝis malsupren en Hungario ĝis ĉe la turka landlimo, ne povis iam dormi pro puloj kaj cimoj, kaj inventis volapukon. Hispana pastro don Bonifacio Sotos Ochando ne estis dormanta kaj subite io trafis lin dum la blanka tago, ĝuste kiel ĉiela revelacio, li levis la okulojn kaj vidis du kolonojn, sur unu estis per fajra skribo kaj laŭbisteme skribitaj nocioj, sur la alia al ili koncernantaj tute strangaj nomoj - jam la dua volapuko. Kaj la d-ro Alberto Liptay, ĉilia kuracisto, dum monatoj vagis tra bovaĝa perua montaro, li enuis kaj inventis, au malkovris, "la lengua catolica", alivorte ĝeneralan lingvon ...

Estas jam tiom da mondlingvoj, ke oni povus klasifiki ilin. La plej malnova el ili estas "lingua philosophica" de oksforda profesoro Dalgarn, kiu vivis jam antaŭ 300 jaroj, post li estas anglikana episkopo Wilkinson (philosophical language). Poste estas don Sinibaldo Mas, hispana ambasadoro de Ĉinio; li inventis "idiografio". Ĝi estas vico de eble 2600 desegnitaj monstretoj, similaj al muziknotoj, kaj ĉiuj prezentas iun nocion; laŭ la linio aŭ interspaco inter la linioj, kie la signoj staras, oni distingas substantivon, adjektivon, verbon ktp. Poste estas "paŝilingua" de prof. Steiner, la mondlingvo korespondanta. Ĉu vi scias paroli? Ekzemple ĉeflingve? Bone, maksimume dum 12 horoj vi ellernos la gramatikon de Steiner kaj jam vi posedas la "mondlingvon". Vi skribas ekz. al iu anglo, li prenas vortaron kaj helpe de la gramatiko li jam bone komprenas... Plue estas ankoraŭ "kosmos" de Eugeno Lauda. Sole la latina lingvo povas esti laŭ li mondlingvo, sed latina lingvo tre simpligita, tial s-ro Lauda "tre simpligis" ĝin. - Same sur la latino staras "la lingvo internacia" de d-ro Esperanto, fakte Zamenhof, la varsovia judo, rusa kuracisto. - Poste estas "Nov-Latino" kaj "Bopal", nova sistemo de prof. Bauer, plue la "bambergita metodo" de s-ro Eichhorn kaj ankoraŭ aliaj, pri kiuj mi ĝis nun nenion detalan scias, eĉ iliaj nomoj mem ĝis nun ne penetris en nian landon. Plej multe famiĝis ĝis nun volapük kaj ĝia provizora sukceso provokis multajn sekvantojn. Centmiloj da homoj jam ludis kun ĝi. Pasintjare en Vieno estis kongreso, en kiu du mil viroj kaj virinoj interkompreniĝis - laŭdire - per volapük. En iuj komercaj lernejoj en Vieno kaj Parizo, en Italio kaj en Ameriko oni regule instruas ĝin. Ĝi jam havas sian literaturon, ĝi havas 20 gazetojn

(ankaŭ la ĉeĥan Volanunel) - nur la estontecon certan ĝi ne havas, kiel ĝin povas havi nenio en la mondo, kio estas konstruita sur la fundamentoj tute arbitraj. Signifoplena kazo por la volapuka popolo: kiam aperis "lingvo internacia" de Esperanto, ĉiuj anoj de nurnberga societo volapuka, de la unua ĝis la lasta, en la sama tago kaj la sama horo, forlasis la kristanan paroĥestron de Lizzelstetten kaj aniĝis al la juda varsovia kuracisto.

Ĉu entute iu povas inventi ian lingvon? Ĉu ne apartenas al la kreado de lingvo ĉiam almenaŭ du homoj? Ĉu ne vivas, ne evoluas la lingvo dum jarcentoj kaj jarcentoj kaj nur poste surmerkatiĝas ĝia gramatiko, ĝia vortaro? Ĉu unuopulo povas sola "militi"? "Konstrui staton?" Elpensi "kulturon"? La respondoj estas facilaj.

Delonge ekzistis grandaj viroj (Descartes, Leibnitz, Voltaire ktp.), kiuj esprimadis sinceran sopiron, ke la homaro havu komunan lingvon, per kiu ĝi interkompreniĝus, la rezultojn de sciencoj ĝi reciproke al si sciigus, eble eĉ poeziajn verkojn reciproke alireblaj ĝi farus. Ke la vorto havu ĉie tra la mondo la saman valoron, kiel havas ĝin depratepe iu ajn varo, kiel havas metala monero; ke oni ĉie komprenu ĝin same bone, kiel oni delonge bone komprenas la telegrafan Morse-signon. Sennombrefoje por tiu celo estis proponata la latina lingvo, kiu dum pasintaj epokoj jam estis komuna scienca lingvo almenaŭ por la eŭropaj popoloj, kaj dum malnovaj tempoj ĝi estis la lingvo de la tuta tiama "mondo" kaj oni parolis ĝin de Anglio ĝis Afriko kaj de Eŭfrato ĝis Atlantiko. Ankaŭ proponata por tiu celo estis multfoje la greka lingvo, lastafoje fare de d-ro August Doltz. Eĉ la ĉina lingvo jam estis rekomendata, plej arde fare de d-ro Tomášek: "1. Ĝi ne havas gramatikajn regulojn, 2. la ĉinan jam nun parolas kvarono de la tuta homaro". La rezulto estas nenia. Kaj ĉu iam estos ia? Ni ne rajtas ĉi tie diri certe: ne estos! Pro la nunaj kontaktoj okazau interesa afero en la homaj lingvoj: vortoj komunaj, al ĉiu homo kompreneblaj, en ĉiuj tiuj lingvoj plimultiĝas. Eblas do tute bone imagi la momenton, kiam la homoj, parolantaj per iu ajn lingvo, preskaŭ komprenos sin reciproke."

Jen fragmento el la longa felietono de Jan Neruda. Evidente li dubis pri la artefarita lingvo, sed samtempe li komprenis, ke tia lingvo estus utila kaj ke ĝi certe iam aperos. Miriga estas liaj scioj pri la diversaj projektoj, li scias eĉ pri la nurnberga konvertigo, sed la unuan ĉeĥan lernolibron de Esperanto li verŝajne ne konis (ĝi aperis nur je unu jaro pli frue - en 1890). Estas bedaŭrinde, ke li mortis tiom frue; se li estus vivanta pli longe - kiu scias? Eble inter la fondintoj de la Praga Esperantista Klubo en la jaro 1902 ne estus nur unu poeto.

(jp)

Jan Neruda: Konsolo (trad. M. Lukáč)

Se vana estas via pen',
vin ne fordonu al ĉagren'!
Ne sekvas volon tuj plenum';
Biblio jam atestas,
ke Dio diris: "Estu lum'!"
kaj lum' - ĝis nun ne estas !

90. jaroj de Esperanto-organizo en Aŭstrujo-Hungarujo, Brno 1991

Pasintjare centjariĝis la unua ĉeĥlingva Esperanto-lernolibro, verkita de F.V.Lorenz - memoriĝis ĝin Esperanto-Klubo Strážnickan per speciala poŝtstampo - kaj ĉiare ni jam celebras 90 jariĝon de la unua Esperanto-organizo sur la teritorio de la iama aŭstria monarkio. "La Unua Societo de Aŭstriaĵ Esperantistoj en Brno" trovis sian sidejon en la sudmoravia metropolo Brno (Bruno), kies urba regento konfirmis la fondon per dokumento datita la 3-an de aŭgusto 1901. "La societo ... disetendas sian agadon en la tuta Aŭstrio ..." oni legas en la statuto.

La fama gazeto Lingvo Internacia en januaro 1902 skribis: "En Bohemuj, en Moravujo, tri sindonemaj Esperantistoj elverkis lernolibron, kiu pligrandigis ĝis 21 la nombron de l'lingvoj, kiuj estas en nia agada kampo. Ilia propagando multe sukcesis, preskaŭ pli ol oni povis esperi: ĵurnaloj presis artikolojn pri nia afero; paroladoj, kursoj estas faritaj en diversaj urboj, eĉ en tute speciala mondo, inter laboristoj; gazeto en Prago (Nový Kult) uzas regule Esperanton; kaj oni povis vidi tiun grandsignifan kaj ĝojigan fakton: la fonda de l' unua societo de Aŭstriaĵ Esperantistoj en Brno (Brünn), kies multaj membroj estas precize tiuj laboristoj, kiujn oni volis prezenti al ni kiel homojn tute ne atingeblojn de Esperanto pro la granda malfacileco nia lingvo (!) kiu, pretendas malefektiva kaj malutila amiko de nia ideo, tro postulas de l'Racio, kaj ne sufiĉe de l'Memoro !!!"

"La Societo dum la jaro 1901 aranĝis 2 kursojn, 5 amikajn vesperkunvenojn, 1 kostuman amuzadon, 2 propagandajn ekskursojn en provincon, - 27 kunvenoj de l'komitato fariĝis. 446 sciigoj pri Esperanto estas dissenditaj al la redakcioj de bohemiaj kaj germanaj gazetoj en Aŭstrujo. La Societo ricevis 141 leterojn petantajn pri sciigoj pri Esperanto, kaj sendis 263 leterojn."

La prezidanto fariĝis 27-jara ĵurnalisto Karel Pelant, kiu post unu jaro transloĝiĝis al Prago, la sekretario Jan Amos Kajš, post kelkaj jaroj idisto, okcidentalisto kaj malamiko de Esperanto. La societo fine restis bazo de la Bruna klubo. En 1902 fondiĝis memstara Esperantista klubo en Praha, poste sekvis kvar grupoj: virina grupo en Praha, grupoj en Plzeň, Č.Budějovice kaj Prosek. En 1905 la Societo en Brno disfalis je partoj ĉeĥa kaj germana.

En junio 1911 okazis en Brno jubilea kunveno de aŭstriaĵ esperantistoj el la Bruna Societo. Salutleteroj kaj telegramoj venis el Lvov, Vieno, Krakovo, Kolozswar, Debreceno, Beogrado, bulgara Novesiola kaj franca Amiens. Ankaŭ d-ro Zamenhof sendis salutleteron. Gastoj el bohemiaj, moraviaj urboj kaj Vieno. La kunveno estis inaŭgurita vespere en restoracio, dimanĉe en kulturdomo okazis propaganda prelego, kiun partoprenis 150 personoj. Posttagmeze promeno tra la urbo, vespere denove amuza habilado en restoracio. Lunde ekskurso al la abatejo Macocha.

Estas dezirinde, ke ĉiujara solena jubilea kunveno, kiu okazos en Brno en junio 7/9, sukcesu almenaŭ tiel bone. Ja ĝi estas jam preparata inkluzive solenan koncerton kaj perŝipan ekskurson.

H.M.

Dum multaj jardekoj furiozis en Esperantujo kvereloj inter la tempistoj kaj aspektistoj pri tio, ĉu la participaj sufiksoj -ita, -ata, -ota esprimas antaŭtempecon, samtempecon kaj posttempecon (tempismo) aŭ rezulton, daŭron kaj intencon (aspektismo). Ekz. laŭ tempistoj oni diru "la kamiono alveturis kaj la ŝranko estis surmetota", ĉar la surmeto okazis post la alveturo, dum laŭ la aspektistoj necesas diri "la kamiono alveturis kaj la ŝranko estis surmetita", ĉar pli gravas la fakto, ke la surmeto vere plenumiĝis, ne restis nur intencata. En 1961 aperis libro "Simpozio pri -ata/-ita", aprobanta la aspektismon, kiu tial estas nomata ankaŭ simpoziismo. Tiun koncepton fine akceptis per voĉdonado ankaŭ la Akademio de Esperanto, kaj ĝi estis aplikita en Plena (Analiza) Gramatiko.

Olav Reiersøl kolektis la regulojn, kiel uzi la participojn laŭ unuopaj simpoziismaj aŭtoroj (Kalocsay, Waringhien, Pampur, Schwartz, Regulo, Lapenna k.a.), kaj ordigis ilin en 6 ĉapitrojn kaj 32 subĉapitrojn por evidentiĝi la fakton, ke la reguloj kaj aŭtoroj kontraŭas unu la alian. Tiamaniere li klopodas pruvi, ke la tempismo estas pli facila kaj aprobinda, kaj ke per aprobo de la aspektismo la Akademio ne solvis la problemon kaj ne unuecigis la lingvon. En la verkaro de Zamenhof eblas trovi ekzemplojn de uzo, kiuj foje kontraŭas la tempismon, foje la aspektismon, sed laŭ Olav Reiersøl pli multaj kongruas kun la tempismo.

Ekzemplo de tia konfrontigo:

B.18. Plena Gramatiko, par. 118.2: "Rilate al la esprimo de la tempo, oni devas noti, ke la pasiva participo, uzata izole, ne havas ĝuste ĉiam la samajn signifojn, kiel ĉe malsimplaj tempoj; nome, la preterita formo montras ĉiam klare finitan, ne plu daŭrantan agon, eĉ ĉe verbo de daŭro sen rezulto: <amita virino> (= ne plu amata virino), dum <ŝi estas amita de mi> estas niam uzata formo.

B.19. Olav Reiersøl: Lingva Respondo n-ro 119 tamen montras, ke Zamenhof akceptis la formon "estas amita".

La aŭtoro de ĉi tiu recenzo, principe aspektisto, povas konsenti, ke la reguloj de la simpoziismaj aŭtoroj ofte kontraŭas ankaŭ lian lingvosenton, sed estas dubinde, ke en la kazo de akcepto de la tempismo ne aperus similaĵ konfliktoj en la uzo de la participoj, ĉar ankaŭ la staton de objektoj necesas ofte esprimadi. Evidentas, ke tro scienca pritrakto de iu problemo nur komplikigas tion, kion la praktiko solvas preskaŭ lude kaj tolereme.

Miroslav Malovec

KUNLABORO INTER SCIENCISTOJ

Dufoje dum jarŝanĝo vizitis la prezidanto de Akademio Internacia de Sciencoj San Marino (AIS), d-ro Helmar Frank, Silezia Universitato en Opava, respektive ties Filozofian Fakultaton. Dum la dua vizito (la 1-an de februaro) li en publika parolado prezentis AIS-on antaŭ 15 fakuloj, inter kiuj estis 10 regantoj de la Internacia Lingvo. La Esperantlingva parolado vekis viglan intereson, des pli, ke ĉe ĝia fino li publikigis oferton al dusemajna senpaga speciala manaĝera kurso (en la germana lingvo kaj en Esperanto) en Berlino por ĉeĥaj kaj slovakaj altlernejaj fakuloj. La alloga oferto estis danke akceptita ankaŭ flanke de Silezia Universitato, kiu post sukcesaj traktadoj kun d-ro H. Frank subskribis kontrakton pri kunlaboro kun AIS. Lige kun ĝi la estrino de nia pedagogia sekcio d-ino V. Barandovská, kiu ekde aŭtuno ekposteniĝis en la universitato lingvokatedro en Opava, komencis februare sian duonjaran restadon en Paderborn, plenumante la funkcion de scienca sekretariino de AIS.

-kov-

ESPERANTISTOJ EN RESANIGA CENTRO HRABYNĚ


En resaniga centro Hrabyně, distr. Opava, kunvenas 6 geesperantistoj, el kiuj estas 2 komencantoj kaj 4 progresintoj, ĉiuj membroj de E-rondeto en Opava. Instruistino M. Grimmová instruas ilin laŭ la lernolibro de Th. Kilian, progresintoj preparas mallongajn rakontadojn en Esperanto. La kunveno estas unufoje dum dekkvar tagoj kaj preskaŭ dum ĉiu kunveno oni lernas iun el Esperantaj kantoj.

En junio 1990 vizitis samideanojn en Hrabyně norvega samideanino Ingbjerg Rambjør, kiu rakontis pri sia profesio kaj patrolando. Dum la kunveno ĉeestis ankaŭ kelkaj samideanoj el Opava. Komunan babiladon kaj kantadon kompletigis ankoraŭ transdono de etaj donacetoj kaj komuna fotografado. Samideanino Ingbjerg post kelka tempo sendis al geesperantistoj en Hrabyně pretajn kolorajn fotografaĵojn por ilia kroniko.

Fine de la jaro 1990 denove vizitis funkciuloj de la rondeto el Opava la esperantistojn en Hrabyně ĉe antaŭkristnaska kunveno. Ĉiuj kantis ĉe violon-ludo kaj ludis societan ludon. La estro de E-rondeto en Opava informis pri la agado de ĈEA kaj rakontis interesaĵojn pri esperantista mondo.

La samideanoj el Resaniga Centro ankaŭ bonvenigus, se samideanoj el Opava aŭ Ostrava preparus por ili ian interesan prelegon en Esperanto, ekzemple pri turismo en eksterlando kun diapozitivaj. Unu tia prelego jam estis promesita.

M. G.



Sur foto: s-ano D. Kočvara transdonas al norvega s-ino kluban suveniron kaj ŝi invitas lin partopreni UEA kongreson en Bergen. Fotografis s-no Wolkovinskiĵ

Ĉu ankaŭ Vi estas ĉasanto inter ondoj ?

Mi ne aludas pri fiŝkaptantoj, ĉasantaj inter ondoj de lagoj aŭ riveroj, sed pri Esperantaj aŭskultantoj ĉasantaj inter la radio-ondoj. La regula aŭskultado de la Esperanto-disendoj de diversaj radiostacioj alportas la vivan Esperanton en nian loĝejon kaj disponigas al mi plej freŝajn novaĵojn el la mondo kaj precipe el Esperantujo.

En Prago mi sukcesas kapti kelkajn staciojn elsendantajn regulajn programojn en Esperanto. Al la tre bone aŭdeblaj stacioj apartenas Studio Zagreb de la Kroata Radio. Bedaŭrinde ĝi elsendas dimanĉe antaŭ la nokto-mezo, do en tre nefavora tempo, kiam mi kutime jam dormas. Tamen la kvalito de la kvaronhora programo (elsendata de la 23,45 h. ĝis la 23,58 h. somere kaj ankaŭ vintre) estas tre bona kaj ankaŭ la kvalito de la aŭdebleco estas eksterordinare bona simple pro la fakto, ke oni elsendas, sur tri najbaraj mezaj ondoj: 262 m, 265 m kaj 267 m (11450, 11320 kaj 11235 kHz). Do, se la aŭdebleco fariĝas malbona, zuliĉas nur iomete movi la butonon por kapti la apudan ondon kaj oni tuj povas bone aŭskulti plu. Provu tion!

La alia stacio, kiu dissendas bonkvalitajn programojn, estas la Svisa Radio Internacia (SRI). Ĝi elsendas dekminutajn prelegojn en Esperanto trifoje semajne: lunde, ĵaŭde kaj sabate je la 14,30 h. (dum la tuta jaro) per mallongaj ondoj 75,28 m, 48,66 m kaj 31,46 m (3985, 6165 kaj 9535 kHz), el kiuj mi plej bone kaj klare kaptas la ondon 31,46 m. Lunde kutime parolas D-ro A. Daur pri svizaj temoj, do pri la politiko, ekonomio, kulturo kaj historio de Svislando (liaj prelegoj formas dikan libron: La fenomeno Svislando, aĉetebla ĉe ĈEA). Ĵaŭde parolas ger-roj Gacond pri Esperantaj temoj kaj sabate A.Künzli pri plej diversaj temoj Esperantaj kaj neesperantaj. Fakte, la elsendotempo (14,30 - 14,40 h.) ne estas tro favora, ĉar labor tage mi ne povas aŭskulti la elsendojn, sed bonŝance SRI ripetas la lundajn kaj ĵaŭdajn prelegojn merkrede kaj sabate kaj mi sukcesas kapti tiujn ripetojn somere je la 9,45 h. kaj 12,45 h., iam eĉ je la 15,15 h. (vintre je unu horo pli frue, t.e. 8,45 aŭ 11,45 aŭ 14,15 h.) sur diversaj ondoj, ekz. 31,38 m, 19,27 m, 16,98 m, 13,78 m k.a., sed tiuj ĝi ripetaj programoj estas direktataj al Azio, do ne al Eŭropo, tial ilia aŭdebleco varias. Provu aŭskulti la elsendojn de SRI kaj poste skribu al ĝi pri via aŭskultado kaj petu senpagan programon kun detalaj indikoj pri la ondolongoj.

Same vi povas ricevi programinformojn, se vi skribos al Radio Vatikana. Tiu ĉi stacio elsendas ĉiŝaŭde matene je la 6,40 h. kvarhoran programon sur mallongaj ondoj kaj ĉiudimanĉe (kaj ankaŭ festotage!) je la 21,00 h. dekminutan programon sur mallongaj ondoj kaj ankaŭ sur la meza 196 m (1530 kHz). Tiu ĉi stacio havas aŭskultantojn tra la tuta mondo kaj en la jaro 1990 la Esperanto-redakcio ricevis pli ol 1300 leterojn, do pli ol cent ĉiumonate. Kontribuu ankaŭ vi per via letero aŭ poŝtkarto al pligrandigo de tiu ĉi nombro en la nuna jaro!

Kiom gravas la skribado de leteroj aŭ almenaŭ de mallongaj poŝtkartoj montriĝis pasintjare ĉe Radio Polonia (Varsovio). En la jaro 1990 plej multe da leteroj ricevis la germana redakcio de Radio Polonia - nome 5498, dum la Esperanto-redakcio fariĝis la dua per 5482 leteroj, do je nuraj 16 leteroj malpli multe! Nur poste sekvis la redakcioj angla, franca, hispana ktp. Do, por Radio Polonia Esperanto tute ne estas ia negrava marĝena lingvo, sed kontraŭe tre grava interhoma komunikilo, kiu ĉi-foje okupis la 2-an lokon, sed en pasintaj jaroj ĝi estis eĉ la unua!

Interese estas, ke la esperantlingvaj leteroj venis plej ofte el Germanio (1177 leteroj), poste el Ĉeĥoslovakio (1125), plue el respublikoj de Sovetio (965 leteroj). Tiuj ĉi nombroj atestas pri la ŝtato de la Esperanto-elsendoj el Varsovio en la koncernaj landoj, sed ankaŭ pri la forto de la tieaj Esperanto-movadoj. Aŭskultu ankaŭ vi la ĉiutagajn duonhorajn Esperanto-elsendoj el Varsovio. La elsendoj komenciĝas somere je la 17,30; 19,30 kaj 23,30 h. (vintre je unu horo pli frue, do je la 16,30; 18,30 kaj 22,30 h.) sur diversaj mallongaj ondoj kaj la lasta vespera programo ankaŭ sur la meza ondo 200 m (1503 kHz). Petu detalan informilon ĉe la adreso: Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Box 46, PL-00 950, Warszawa, Polska.

La adresoj de la ceteraj stacioj estas jenaj:
Kroata Radio Zagreb, Esperanto-Fako, YU-41000 Zagreb;
Svisa Radio Internacia, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15;
Radio Vatikana, Esperanto-Fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma.
La landonomoj oni skribu ĉeĥlingve.

Multajn sukcesojn kaj ĝojojn dum la ĉasado inter la ondoj!

Jiří Paterná

.....

MUDr. Pavel Páral, Ústí nad Labem:

Ĉu propraj seksaj meritoj garantias kontentan edzecon?

Tuj enkonduke oni devas diri senvuale, ke tio estas ĝuste male. La plejparto de junaj homoj koitis jam antaŭ la nupto kun unu aŭ kelkaj kunuloj, sed tamen praktike unu duono de geedzparoj pli frue aŭ malfrue disiĝas. Sur kio baziĝas tiu ĉi terura malsukceso? Seksajn problemojn havas la homaro ekde la mondekesto kaj tial estus instrue enrigardi ĝis en la antaŭhistorion. En unu raporto el la pratempo (Genezo) oni legas pri geedzeco en la paradizo, kiu estis monogamia (unu + unu) kaj heteroseksa (viro + virino). Ambaŭ estis nudaj, sekekuniĝadis, ne hontis kaj iartis tre bone. Ĉu estas pensebla tia bela kaj firma geedza ligo eĉ fine de la dua jarmilo? Mi konjektas, ke kun la respekto de certaj leĝoj tio estas eblá. La paradizon por homoj organizis Kreinto de la universo kaj en ĝia limzono Li dislokis dek limátonojn. Unu el la ŝtonoj portas surskribon "ne adultu". La traduko en la hodiaŭan lingvon signifas "ne havu eksteredzecon sekskuniĝon". Ĉe tiu ĉi limátono finiĝas la paradiza teritorio kaj komenciĝas infero. Ĝia aspekto estas ofte gaja (seksaj distraĵoj inter gefraŭloj, inter sameksuloj, amrilatoj kun kromviroj kaj kromvirinoj, kolektiva seksamuzo de pluraj personoj, senedza kunvivo de gevidvoj kaj geemerituloj, salajrita koito, profitado de prostituado, vizito de bordelo, ekscitiĝo per pornografia literaturo kaj filmo aŭ vulgara seksamuzo dum kopulacio kun brutoj), sed la postkulisejo estas malgajega. Ĉiu eopiras al geedza paradizo kaj timas geedzan inferon. Kaj tial mi povis ripete aŭdi jenan demandon: "Kiamaniere mi ekkonos, ke ŝi estas la vera? Por ke mi ne eraru!" aŭ "Ĉu knabinoj povas ekkontakti knabojn? Se jes, kia maniero estas kontraŭa?". La demandoj enhavas sopiron, eĉ timon. La knabino kompreneble povas kontakti knabon, sed ne "per vagino". Se la knabino permesos koiton antaŭ la nupto, ŝi malfacile ekkonos, ĉu la knabo amas ŝin vere kaj serioze. Se la knabo volas knatiĝi kun la ĝusta fraŭlino, ne sufiĉas sole ilia reciproka plaĉo, sed necesas certa

tempo de interkonatiĝado (oni diru du jarojn) en la afero de pensoj, intereso, celoj, laboro kaj kredo. Samtempe oni devas bremsi la karnan proksimiĝadon ekz. per tio, ke dum la plurtaga turismo ili dormos aparte. Koncize dirite: "kuniradu sed ne kunkuŝu". Plia demando: "Kiel longe devas daŭri la konatiĝado? Kion fari kun knabo, kiu post du jaroj de interkonatiĝado ne emas edziĝi?" Se ili du sekse kunvivas, la decido estas iam malfacila. En kontraŭa kazo tio estas pli facila. Aŭ ili miskomprenas unu la alian kaj ili disiros ĝustatempe sen pli granda doloro aŭ ili tiel bone konatiĝis amante unu la alian, ke ili decidis por la nupto, por ke ili povu ankaŭ sekse kunvivi. La sopiro je kio fakte determinos la daton de geedziĝo.

"Sed kion fari, se la geedzoj konstato en la nupta punkto, ke ili ne taŭgas por karna interrilato?" Tio estas ja logika antaŭtimo, sed banaj homoj ne bezonas timi, ĉar ili havas amasegon da tempo por ellerni kaj ekzerci la seksan teknikon. Memkompreneble se ili havas ian korpan aŭ psikan defekton, estas necese konsulti seriozan kuraciston ankoraŭ antaŭ la gefianĉiĝo. Kiam mi kiel kuracisto parolis kun junaj homoj, ke eĉ gefianĉoj ne havas permeson al kio, ili fine demandis min: "Do kiajn sekvojn havas la antaŭnupta kio por homo?" Mi povus respondi koncize: "Ĉiam negativajn". Sed mi klopodos respondi en kelkaj punktoj.

1. La antaŭgeedza amrilato devalorigas kaj perdas sian pozicion.
2. Ĝi plifaciligas edzan kokron kaj kondukos al pli grandigita ekgeedziĝado.
3. Iam la gefianĉoj disiras nenecese, ĉar la viro ne estas kontenta kun atingita kulmino kaj la virino perdas siajn idealojn.
4. La geedziĝon vidas tiaj gefianĉoj kiel probleman, eĉ superfluan. La geedziĝdato ne havas plu realan bazon en la natura sopiro al kio; tial plejparte la daton ili determinas nur post koncipado de infano.
5. La antaŭtempa kaj neplanita koncipado de infano havas multajn danĝerojn. Tiu ĉi gepatroj ne pensas je teratogena alkoholo inkl. biero kaj aliaj venenaj substancoj kaj medikamentoj, kiujn oni devas elasi sufiĉe longe antaŭ koncipado. Ili ambaŭ ne pensas je kreado de varmo de familia kameno sen streso kaj je ĝoja kunatendado de la infano.
6. Mi devas ankaŭ mencii la ofte tutvivan konecian aŭ subkonecian senton de la kulpo rezultantan el "makulita dosiero" per transpaŝo de la Dia leĝo; por tiu ĉi delikto ekzistas alta puntarifo: infero kaj morto.

Fine la fermdemando: "Ĉu ekzistas pozitivaj sekvoj de la sekva abstinado en la fianĉa periodo?" Jes! Belega kaj romantika amikeco antaŭnupta transiranta en postnuptan piezuregan geedzecon kun kuniĝo eĉ en la intima sfero. Havu do kuragon vivi laŭ la originaj leĝoj.

Glosoj de redaktoro:

teratogena = naskanta monstren

dosiero = 1 aktaĵo; 2 polica registro de deliktoj

Bernard Golden : Esploro pri eks-esperantistoj

Ankoraŭ ne estas centprocenta akordo en la Esperanta lingvokomunumo pri la difino de esperantisto, kun la celo diferencigi tian homon disde esperantano kaj simpatianto de Esperanto. Ĉu do havas sencen provi priskribi ia alian flankon de la monero, sur kiu troviĝas la eks-esperantisto aŭ la mal-esperantisto? Aŭ ĉu eble estas pli facile difini tiun tipon ol la esperantiston mem? Kiam oni parolas pri eks-esperantisto, oni kutime pensas pri homo, kiu, post pli-malpli longa restado en Esperantujo, pro diversaj kialoj perdas intereson, fidon kaj lojalecon rilate la lingvon kaj la movadon kaj ĉesigas sian agadon. Estas emfazinde, ke la kapablo uzi Esperanton estas grava kriterio. Homoj, kiuj komencis lerni Esperanton, sed post relative mallonga tempo seniluziiĝis pro la troigo kaj blufado de propagandistoj, ne apartenas al la sama kategorio de eks-esperantistoj kiel tiuj, kiuj primajstris la lingvon, aktivis en pluraj aferoj dum jardekoj kaj poste ekŝiĝis. Tiuj ĉi estas la plej facile identigeblaj kaj portas la nomon kabeintoj, ĉar ili sekvas la paŝojn de KABE (pseŭdonimo de Kazimierz Bein), kiu frue en la 20-a jc. agadis sur la beletra tereno, sed subite kaj sen evidenta kialo, forlasis la Esperanto-komunumon kaj neniam revenis.

Parentoj de la esperantistoj, kiuj kabeas, estas la renegatoj. Ili apostatiĝas, ĉar ili trovas, ke la lingvo mem aŭ ties movado ne kontentigas iliajn postulojn. Tamen, ili ne malaperas de sur la internacilingva scenejo, sed turnas sin al alia planlingva projekto. Tiu procedo povas ripetiĝi plurfoje, kiam novaj planlingvoj aperas, ĉiu "pli bona" ol la antaŭa. Tiel okazis, ke eks-esperantistoj fariĝis ankaŭ eks-Idistoj kaj eks-Occidentalistoj, ĝis la lasta lingvoprojekto, pri kiu ili okupiĝis, sekvis ilin en la tombon.

Verdire, la kabeintoj kaj apostatoj ne prezentas grandan minacon kontraŭ la Esperanto-movado, se ili fine malaperas en la abismo de forĝeso. Male, ekzistas eks-esperantistoj, kiuj agas inside kontraŭ Esperanto, ĉar ili ne forlasis la Esperanto-komunumon. Mi nomas ilin maleesperantistoj aŭ "stojanintoj", ĉar ili imitas la agadon de Petro Stojan. Tiu ĉi ulo, dum pluraj jardekoj fervoje aktivis por Esperanto, sed pro mensa perturbo komencis agi mallojale, publikigante sub pseŭdonimoj plurajn "plibonigojn" de Esperanto. Lia konduto estas riproĉinda, ĉar li publike ne forlasis la movadon, sed agadis malhoneste kaj malice malantaŭ la kulisoj. Kompreneble, neniu statistikoj pri homoj, kiuj "stojanas" nuntempe, estas akireblaj. En religiaj komunumoj kaj politikaj partioj ekzistas rimedoj por liberigi la organizaĵon de membroj, kiuj ne volas marŝi laŭtakte kun la plejmulto aŭ kiuj sabotas planojn kaj programojn; oni simple aplikas la punojn de ostracismo, ekzilo aŭ ekskomuniko. Tiuj procedoj ankoraŭ ne ekzistas en la Esperanto-komunumo; eĉ anatemo apenaŭ efikas, se la fidelaj membroj ne agas solidarece por devige eks-esperantigi maleesperantistojn.

Mi proponas kiel valoran projekton por movad-historistoj profundan esploron pri la fenomeno de eks-esperantisteco por eksci, ĝis kiu grado influas nivelo de alproprigo de la lingvo, intensenco de partopreno en movadaĵ agadoj kaj personaj faktoroj povantaj okazigi konfliktojn kaj fine, eks-esperantistiĝon.

HONORAJ MEMBROJ DE ĈEA

(daŭrige)

* František Pytloun (1891 - 1976)

naskiĝis la 30-an de junio 1891 en Vápno, ap. Trutnov. Profesie li estis fervoja oficisto, kio ebligis al li multe vojaĝi. Membro de la landa Esperanto-Asocio kaj de UEA ekde 1922, plenumis plurajn funkciojn en la movado, ekz. li estis sektretario kaj prezidanto de EK en Hradec Králové dum ĝia florado post 1945, komitatano de EAĈSR kaj regiona peranto, komitatano de UEA (1949 - 1950). Estante fervora propagandisto li fondis klubojn en 12 lokoj de la nordorienta Bohemio, eldonadis belan Esperantan poŝkalendaron kaj vortaretojn. Akirinte diplomon de Ĉseh-instruisto en Danlando (1933) li gvidis kvardek kursojn de Esperanto en 11 lokoj kaj de 1946 gvidis dum pluraj jaroj korespondajn kursojn kun pli ol 4000 lernantoj (kontrolitajn de d-ro Pitlík). Kun Kořínek li prizorgis la Gazetaran Servon de EAĈSR kaj aktivis en aranĝado de internaciaj renkontiĝoj en Poděbrady. Estas ĉefe lia merito, ke Hradec Králové havas Straton de Zamenhof (en kiu li loĝis). František Pytloun donis senprofiite siajn fortojn al la Esperanto-movado. Li mortis en Poděbrady la 15-an de oktobro 1976.

* Miloš Lukáš (1897 - 1976)

naskiĝis la 15-an de septembro 1897 en Jilemnice. Li estis gimnazia profesoro de klasikaj lingvoj, filologo. En j. 1949 - 1951 komisiito por Esperanto en la ministerio por informoj kaj klerigo. Konata poligloto, esperantologo, poeziulo kaj aŭtoro de multnombraj tradukoj, el la originalo li ĉefigis la estonan nacian eposon Kalevi-poeg, esperantigis versojn el la novgreka lingvo kaj el sanskrito, tradukis el la lingvoj albana, kartvela k.a. Li perfekte ĉefigis ĉiujn poemojn de Zamenhof, estas aŭtoro de multaj Esperantaj tradukoj el la ĉeĥa - ekz. en la Ĉeĥoslovaka Antologio, de la teatraĵo Nokto en Karlův Týn de Vrchlický, prezentita en la Vinohrady-Teatro por la XIII-a UK, de la novelaro Muta barikado de Drda, k.a. Li kunlaboris al pluraj revuoj, ekz. Literatura Mondo. Komence de sia Esperanta kariero li uzis la pseudonimon Vaneso.

Mallonge idinto, li iĝis adepto de Esperanto en 1907, estis delegito de UEA dum jardekoj, de 1918 dumviva membro de UEA, Esperanto-klubestro en Trnava (1934 - 1936), honora membro de la EK en Hradec Králové (1947), ekzamena komisiito de EAĈSR, honora profesoro de Cattedra Italiana di Esperanto en Bolonjo (1919). Li gvidis kursojn de Esperanto kaj prelegis pri ĝi. Li mortis la 26-an de aprilo 1976 en Hradec Králové. Priversis lin Kalocsay: "En lia brila interpreto / Poemoj ĉeĥaj elokventas, / Miloš Lukáš - la violeto, / En ombro, kase diligentas." kaj Kořínek en omaĝa odo adiaŭis lin: "... kiom da genoj de la arta dono / el la parnasa ĉeĥa reĝokrono. / ... Mi jetas kline antaŭ via verko / kun larm' bukedon ĉi post via ĉerko..."



en kurta kuloto

» La Infanoj de Eŭropo «

estas nova societo laboranta ekde 1987 en malgranda franca urbeto Bézé proksime ĉe Dijon. Profesoro Michel Feuchot, nun prezidanto de la Societo de Infanoj de Eŭropo (Communauté des Loupiots d'Europe), komencis okupiĝi per ideo aranĝi renkontiĝojn kaj konatiĝojn de Eŭropaj infanoj. La unua renkontiĝo la "Infanoj de Eŭropo" okazis en Strassburg, la dua en Bézé kaj nun estas la tria preparata en Ĉeĥoslovakio, en Brno. Kial ĝuste en Brno? Ĝuste ĉi tie komenciĝis la unuaj amikecoj inter la infanoj ĉeĥoslovakaj kaj francaj jam kelkajn jarojn

antaŭ novembro 1989. Ĉijara renkontiĝo de infanoj el Germanujo, Svislando, Nederlando, Jugoslavio, Hispanujo, Portugalujo, Belgio, Francujo kaj ĈSFR efektiviĝos en junio 1991 (20/24) kaj inaŭguros ĝin, laŭ promeso, la prezidento de ĈSFR, Václav Havel. Dum la renkontiĝo oni kantas kanton de Petr Uirych en pluraj naciaj lingvoj kaj eble ankaŭ en Esperanto.

DEKLARACIO DE RAJTOJ DE EŬROPA LERNEJANO (propono laŭ profesoro Michel Feuchot)

Eŭropo fratema kaj amikema estas konstituita pli facile, se ĝiaj estontaj politikistoj agos komune, sciencistoj esploros komune, entreprenantoj entreprenos kune, civitanoj konsiliĝos kaj interkonsentados jam de lerneja aĝo.

1. La titolon de "Eŭropa lernejano" povas akiri ĉiu infano el landoj de la Eŭropa Komunumo ekde la unua klaso ĝis la fino de la elementa lernejo (maksimume ĝis 16 jaroj).
2. Por Eŭropa lernejano validas ĉiuj rajtoj difinitaj en la deklaro - sen limigo de raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, deveno ktp.
3. Eŭropa lernejano havas rajton je edukado - senpaga kaj deviga, kiu kontribuas je lia kulturo, je disvolvo de liaj kvalitoj, de persona juĝkapablo, je morala kaj sociala respondeco fariĝi utila membro de la Eŭropa Komunumo.
4. Eŭropa lernejano havas rajton je Eŭropa civitana edukado, kiu pravigas lian membrecon en la Societo, permesas al li rekoni individuon kaj respekti diferencojn, plibonigadi reciprokajn kontaktojn, en kiuj lingvo ne rolas kiel nevenkebla baro.
5. La rajtoj de Eŭropa lernejano efektiviĝos,
 - a/ se la infanoj dum lerneja instruado lernas unu eĉ plurajn Eŭropajn oficialajn lingvojn,
 - b/ se ili komunikos per korespondado, aŭ per liberaj interŝanĝoj de lernantoj,
 - c/ se Eŭropa lernejano povas sola aŭ kun sia klaso libere moviĝi en ĉiuj landoj - membroj de la Eŭropa Komunumo. La libereco de moviĝo permesos al li plibonigi siajn sciojn lingvajn, kulturajn, sciencajn kaj teknikajn ...


d/ Eŭropa lernejo lernos libere, respondeco, iniciateco, komune li serĉos solvon de problemoj, li realigos tion, kion koncernos ilin.

Necesas krei por lernantoj kaj por la mondo, por kiu ili estas preparataj, novajn kondiĉojn en la materia, intelekta kaj ampleksa medio. Disvolvi amikrilatojn inter lernejoj, klasoj kaj lernantoj.

e/ Eŭropa lernejo rajtas posedi la titolon "Eŭropa lernejo" kaj lia lernejo rajtas posedi la titolon "Eŭropa lernejo".

Rimarkigo de red.: se vi volus scii pluajn informojn, turnu vin je la adreso:

S-ino Ludmila Novotná, La Societo de Infanoj de Eŭropo, elementa lernejo, str. Pavlovská 16, CS - 623 00 Brno.



KORO — kanto por Bruna renkontiĝo de Infanoj de Eŭropo


Muziko kaj teksto: P e t r U l r y c h




1. Diru al ni, homoj, diru, kiel mondo en mi-zer', diru al ni, homoj, diru
 2. Pli ol grand'aj ni komprenas kion volas ĉi pla-ned', ne atentu ĉu ĝin mundos




kial idoj en dan-ĝer', diru al ni, homoj, diru kia estos morgaŭ ter'. Ĉu ĝi
 frenezuloj per ra-ke't', ni komprenas ke ĝin savos homaj koroj, homa sent'. Ĝi ne-



sonos per la kor'ĉu ĝi sonos ... au per seka konsider', ĉu ĝi
 niam mortos for se ĝi sonos per ... se kampoj spiros... kaj arbaroj per foliar', se ĝi



sonos per la ... sonos per ...ankaŭ koro ne nur seka konsider'. Vokas knaboj de Eŭ-
 sonos per la ... sonos per ...ankaŭ koro ne nur seka konsider'.



ropo: mondo restu sen dolor', paco regu sur ter- globo, se ĝi sonos per la kor'.

D. S. al Fine

1. Diru al ni, homoj, diru,
 kial mondo en mizer',
 diru al ni, homoj, diru,
 kial idoj en danĝer',
 diru al ni, homoj, diru
 kia estos morgaŭ Ter'.

Ĉu ĝi sonos per la kor'
 ĉu ĝi sonos per la kor'
 ĉu ĝi sonos per la kor',
 aŭ per beka konsider',
 ĉu ĝi sonos per la kor'
 ĉu ĝi sonos per la kor'
 ankaŭ koro, ne nur
 beka konsider'.

2. Pli ol grandaj ni komprenas
 kion volas ĉi planed',
 ne atendu ĉu ĝin murdos
 frenezuloj per raket'!

Ni komprenas ke ĝin savos
 homaj kercoj, homa sent'.
 Ĝi neniam mortos for
 se ĝi sonos per la kor',
 se kampoj spiroj per bekal'
 kaj arbaroj per foliar',
 se ĝi sonos per la kor',
 se ĝi sonos per la kor',
 Tero spiroj per bekal'
 kaj foliar'.

Ref.: Vokas knaboj de Eŭropo:
 mondo restu sen dolor',
 paco regu sur terglobo
 se ĝi sonos per la kor'.
 Diru al ni, homoj, diru,
 kia estos morgaŭ Ter'.

D.S. al Fine: Ĉu ĝi sonos per la kor',
 ĉu ĝi sonos per la kor'
 ĉu ĝi sonos per la kor',
 aŭ per beka konsider',
 ĉu ĝi sonos per la kor'
 ĉu ĝi sonos per la kor',
 ankaŭ koro, ne nur beka konsider'.

Trad.: M. Malovec

.....

El niaj kluboj kaj rondetoj

Esperanto-klubo Vítkovice: Politikaj ŝanĝoj faligis la barierojn por vojaĝi al eksterlando, sed samtempe venigis ekonomiajn obstaklojn. Ni kutimis ricevi de Domo de Kulturo subtenon en formo de senpagaj klubetoj, nun oni postulas por ili pli ol 10000 kronojn jare, dum ni kapablas perlabori per niaj kursoj nur kvinonon. Tial ni devis post 38 jaroj de kunlaboro foriri. En Kultura Centro de Ostrava oni proponis al ni kunvenojn kondiĉe, ke ni malfermos du Esperanto-kursojn, sed ni sukcesis - certe pro la momenta entuziasmo por la angla - malfermi nur unu kurson. Denove ni devis foriri, sed ni fine trovis rifuĝejon en malgranda salono de TYPOGRAFIA, Novinářská 3, Ostrava 1, ĉiumerkrede inter la 15-a kaj 20-a horoj. Por unu kunveno ni pagas 56 Kčs.

Esperanto-klubo Ostrava-Poruba: Klubo en Ostrava-Poruba devis forlasi Doman de Kulturo kaj sukcesis trovi klubeton en klubo de emerituloj kie ili ricevas ĉiusemajne klubeton por du du horoj sub kondiĉo, ke ĉiuj membriĝos al ilia klubo kaj pagos 10 Kčs jare. Tamen la solvo estas nur provizora, ĉar por la junularo restis la pordo fermita.

Rememoroj je ICEM renkonto en Svedujo, aŭgusto 1990,

de Jarmila Rýznarová, Pardubice

(ICEM = Internacia Celado por Edukado Moderna per Esperanto pri Freinet pedagogio)

Jam dufoje mi partoprenis ICEM renkonton kaj ĉiam mi estis ege kontenta. Do mi streĉis fortojn kaj eblojn, ke mi povu denove partopreni ICEM en Svedujo. Ankaŭ politika situacio en nia lando lomete helpis, ke ni ne bezonis prizorgi vizojn, do mi kuraĝiĝis kaj kun mia filino Mirka preparis nin por la vojaĝo. Ni aliĝis al ICEM renkonto nur por la duono de restado pro financaj kialoj kaj por la dua semajno ni estis invititaj al privata vizito de nia sveda amiko en Stokholmo.

En la sveda urbo Alvesta laŭ la plano, nia sveda amiko Arne estis nin atendonta, sed la trajno alveturis 7 minutojn pli frue kaj la malgranda stacidomo estis tute malplena. Ĉu ni devas elvagiĝi, aŭ la trajno ankoraŭ ne alvenis al ĉefstacidomo de la urbo? Ni tamen elvagiĝis kaj mi preskaŭ ne spiris pro timo, kiamaniere ni interkompreniĝos kun svedoj, se nia amiko ne atendas nin, ĉar de Alvesta al la loko de ICEM-renkonto estis preskaŭ 200 kilometrojn per trajno kaj buso. Ni proksimiĝis al stacidoma atendejo decidintaj atendi eĉ 2 horojn, kiam subite mia sveda amiko aperis kontraŭ ni. Eĉ li ne kredis, ke nia trajno venis tiel frue. La granda ŝtono falis de sur mia koro.

Poste per lia aŭto ni traveturis multajn urbetojn kaj vilaĝojn admirante belajn dometojn kun ĝardenoj plenaj de floroj, sed nenie ni vidis ĝardenojn kun legomo. Mi ricevis respondon: kial tion mem kultivi, se estas eble ĉion malmultekoste aĉeti (kia diferenco kontraŭ ni!).

En bone ekipita unuetaĝa domo meze de granda herbejo kun aŭtoparkejo, en trankvila loko Hornöbgården ĉeestis proksimume 40 gesperantistoj okaze de ICEM renkonto. Mi eĉ ne kredis, ke mi tie trovos tiom da konatoj el Poznań kaj Ollainville. Tuj mi estis kvazaŭ inter bona parenĉaro.

La venontan tagon ni partoprenis la tuttagan ekskurson al proksima insulo Oland, kiu estas en sia mezo kunligita kun kontinento per longega belega ponto ĉe la urbo Kalmar. La tuta insulo estas 140 km longa kaj 4 - 16 km larĝa. Loĝas tie 24 mil loĝantoj. Per 8 aŭtomobiloj ni traveturis la sudan duonon de la insulo kaj laŭ plano ni haltadis ĉe unuopaj interesaĵoj. En 40 km granda stepo sen arboj, kie paŝtis sin multaj ĉevaloj, estis ofte videblaj kalkŝtonaj rokpecetoj, multe da ventmueliloj, kiuj nun jam servas nur kiel turismaj atrakcioj. Ni traveturis kelkajn vilaĝojn, naturrezervacion, kie sveda reĝo Gustavo ĉasadis damcervojn - bedaŭrinde ni vidis anstataŭ ili nur multajn ŝafojn kun nigraj kapoj. Ni proksimiĝis al fino de la insulo, kie staras bela lumturo "Longa Johano", konstruita en j. 1784. Tie estas ankaŭ muzeo de migrantaj birdoj. La vojaĝo reen sur alia flanko de la insulo prezentis al ni pluajn interesaĵojn, ekzemple fortikaĵon Eketörps, fiŝkaptistan havenon, pluajn ventmuelilojn, tombon de Vikingoj-virinoj, diversajn tombaĵojn el ferepoko kaj tre interesan malnovan tombejon, kie altaj ŝtonoj staras en granda elipso.

Pluajn tagojn ni vizitis privatan farmon, kies 45 hektaran bienon kun 40 bovinoj prizorgas nur unu geedza paro, fabrikon de vitroproduktado, muzeon, katedralon, fortikaĵon Kalmar, sed ankaŭ

antaŭlernejoj, vilaĝan bazan lernejon, eĉ vilaon de ĝia direktorino kaj muzeon de estinta malnova gastejo el la jaro 1753. Ne pensu, ke ni dum ICEM-renkonto nur ekokursis. Ni ankaŭ diligente lernis en diversaj kursoj, aŭskultis prelegojn kaj vespere ni kolektive amuzis. Bedaŭrinde, ke en tia agrabla medio la tagoj tiel rapide forpasis kaj venis la tago de adiaŭo.

Sed por mi kaj mia filino nia vojaĝo ankoraŭ ne finiĝis. Denove alveturis nia sveda amiko Arne kaj aŭtomobile ni traveturis multajn kilometrojn norden al Stokholmo. Li loĝas en bela loĝkvartalo de 36 samaspektaj familiaj dometoj enhavantaj 6 ĉambrojn kun granda dependaĵo kaj ĝaraĝo. Arne akompanis nin dum 6 tagoj tra Stokholmo kaj ni eĉ ekokursis al la finna insulo Alan, kiu estas sur duona vojo inter Svedujo kaj Finnlando. Ĝian urbon Mariahamn oni nomas la urbo de mil tilioj kaj vere ĝi estas belega pro sia verdaĵo.

Nia 11-etaĝa ŝipego estis por 2200 homoj. Pli ol 10 horojn ni estis sur la maro, sed ni ne enuis. Diversaj klubejoj, kafejoj, noktaj kluboj, restoracioj, memserva vendejo, infana ludejo, saŭno, naĝbazeno kaj promenado tra la eĝa ŝipego donis al ni multajn impresojn. Helpis ankaŭ bona vetero.

Mi forveturis hejmen kun la espero, ke eble Dio permesos al mi ankoraŭ kelkajn jarojn vagadi sur la tero, kaj ke mi klopodos en la jaro 1993 organizi ICEM-renkonton en Ĉeĥoslovakio, esperante, ke la komplika politika kaj ekonomia situacio post tri jaroj jam tranĉviliĝos.

ĈU VI ŜATAS TURISMON SEN HOTELOJ KAJ AŬTOMOBILOJ ?

Skribis al ni s-ano Leo Mezencev el Sverdlovsk (SU). Li estas novico en Esperanto kaj havas intereson interŝanĝi nian gazeton STARTO kontraŭ poŝtmarkoj aŭ bildokartoj. Li volus korespondi kun grupoj de esperantistoj, kiuj deziras vagadi kun dorsosako en lia patrolando. Vojaĝontoj povos loĝadi en urbaj loĝejoj en Moskvo aŭ Alma-Ata kaj mangi en publikaj manĝejoj. Apud Alma-Ata oni povos viziti Medeon (olimpikan glitkurejon), vagadi laŭlonge de antaŭmontaro de Tjan-Ŝan, eĉ viziti glacirivereton. En tia okazo oni devos loĝi en propraj tendoj. La plej bona tempo por vizito de Alma-Ata estas (laŭ s-ano Mezencev) aŭtuno, fino de septembro kaj komenco de oktobro. La viziton de Moskvo oni povos kunigi ankaŭ kun vojaĝo en Urala regiono. Ĉi tie oni povos en julio flosi per kanoto laŭlonge de la rivero Ĉusovaja. Estas eble bicikli kaj viziti kavernojn. Se Vi ŝatas detalojn, skribu al adreso:

Rumjancev (Mezencev), SU-620142 SVERDLOVSK, Frunze, 20,135.

Grava helpilo: **poštovní tarify do zahraničí**

1. Psaní

a/ Maďarsko, Německo, Polsko, Rakousko, SSSR:		c/ země mimo Evropu letecky:	
do 20 g	Kčs 4,-	do 10 g	Kčs 6,-
		do 20 g	8,-
		do 30 g	12,-
b/ další země v Evropě;		do 40 g	16,-
země mimo Evropu pozemní cestou:		do 50 g	20,-
do 20 g	Kčs 5,-	do 75 g	30,-
		do 100 g	40,-
dále a/ i b/:		do 150 g	59,-
do 50 g	Kčs 11,-	do 200 g	79,-
do 100 g	22,-	do 250 g	98,-
do 250 g	43,-	do 300 g	118,-
do 500 g	77,-	do 350 g	137,-
do 750 g	108,-	do 400 g	157,-
do 1 kg	139,-	do 450 g	176,-
do 2 kg	272,-	do 500 g	196,-
		do 750 g	293,-
		do 1000 g	391,-
		do 1250 g	488,-
		do 1500 g	586,-
		do 1750 g	683,-
		do 2000 g	781,-

2. Dopisnice (pouze do rozměru 15 x 10,7 cm, jinak musí být vyplaceny jako psaní):

a/ Maďarsko, Německo, Polsko, Rakousko, SSSR:	2,- Kčs
b/ ostatní země v Evropě:	3,- Kčs
c/ země mimo Evropu pozemní cestou:	3,- Kčs
letecky:	5,- Kčs

3. Tiskoviny

a/ pozemní cestou;		b/ letecky Evropa;		c/ letecky ostatní	
do 50 g	Kčs 7,-	8,-		16,-	
do 100 g	13,-	14,-		31,-	
do 250 g	32,-	33,-		77,-	
do 500 g	63,-	65,-		153,-	
do 750 g	94,-	99,-		229,-	
do 1 kg	125,-	131,-		305,-	
do 1,5 kg	187,-	197,-		457,-	
do 2 kg	249,-	262,-		609,-	
dále jen knihy a brožury					
do 2,5 kg	311,-	328,-		761,-	
do 3 kg	373,-	393,-		913,-	
do 3,5 kg	435,-	459,-		1.065,-	
do 4 kg	497,-	524,-		1.217,-	
do 4,5 kg	559,-	590,-		1.370,-	
do 5 kg	621,-	655,-		1.522,-	

4. Balíčky (do hmotnosti 2 kg, do některých zemí jen 1 kg, popř. 500 g)

	pozemní cestou	letecky Evropa	letecky ostatní země
do 100 g	Kčs 18,-	19,-	36,-
do 250 g	37,-	38,-	82,-
do 500 g	68,-	71,-	158,-
do 750 g	99,-	104,-	234,-
do 1 kg	130,-	136,-	310,-
do 1,5 kg	192,-	202,-	462,-
do 2 kg	254,-	267,-	614,-

podle Věstníku spojů sestavil K.D.

Korespondi deziras

POLLANDO

* Henryk KRUCZEK, ul. 1.maja 28 A, PL- 32-590 LIBIAZ', 53-jara komencanto, kolektas bildkartojn * Irena ZIENTARSKA, ul. Radomska 16/28, PL- 41-219 SOSNOWIEC, 35-jara psikologino * grupo de komencantoj 12 - 15-jaraj je la adreso e-ino Irena Zientarska, Esperanto-grupo, Szkoła Podstawowa nr.39, ul. Lubelska 51, PL-41-219 SOSNOWIEC * Grzegorz POKRZYLNICKI, post box 165, 81-969 GDYNIA, 35-jara, pri turismo, folkloro, fotografado, automobiloj, kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, fotolibrojn * Leszek KLUZA, PL-88-140 GNIEWKOWO, 28-jara poŝtisto, pri sporto, flagetoj, bankbiletoj, insignoj *

NEPALO

* Narendra MANANDHAR, L.Sc. Kha 3-(2) KATHMANDU 3, Chikanmugal, Nhubahal, 19-jara komencanto * Rabindra ROY, L.Sc. Forestry, Kha 2-783, KATHMANDU 2, Ombahal, 18-jara *

BRAZILIO

* Mauricio José Spada Borges, Rua Siqueira Campos n. 3912, CEP. 15.010 - S.J.Rio Preto - SP. - Brasil, 15-jara studento *

BULGARIO

* Borja VASILEVA, P.K. 74, SOFIO - 1220 : organizas kontaktejon edziĝecele por solecaj gesperantistoj *

TRI JUNULOJ, MORTO KAJ SAKO DA ORO

Tri junuloj sidis en gastejo. Ili trinkis vinon kaj fercis. Subite ili aŭdis bruon de ekstere. Ili rigardis tra la fenestro kaj vidis kelkajn homojn, kiuj portis ĉerkon.

"Kiu mortis?" ili demandis.

La gastejestro diris al ili la nomon de la mortinto. Tio estis nomo de ilia amiko, ankaŭ juna viro. La tri junuloj estis tre surprizitaj. Ili ne povis kredi proprajn orelojn. Sed la gastejestro diris: "Jes, ĝi estas vero. Via amiko mortis. Morto prenas maljunajn kaj ankaŭ junajn. Li prenas multajn homojn. Proksime de ĉi tie estas vilaĝo, en kiu Morto ĉiutage iun mortigas. Baldaŭ ĉiuj vilaĝanoj estos mortaj. Mi opinias, ke Morto loĝas en tiu vilaĝo."

Niaj tri junaj amikoj trinkis multe da vino kaj tial ili pensis, ke Morto vere loĝas proksime. Ili tre koleris kontraŭ Morto pro mortigo de ilia amiko. Ili diris: "Ni iru kaj mortigu Morton! Ni iru antaŭ ol venos nokto."

"Estu singardaj," diris la gastejestro. "Se vi renkontos Morton, li mortigos ankaŭ vin."

"Ni ne timas," respondis la tri junaj viroj. "Ni iros kaj serĉos Morton. Ni estos fratoj kaj defendos unu la alian. Kaj kiam ni trovos Morton, ni mortigos lin."

Kun ĉi tiuj vortoj ili forlasis la gastejon kaj iris sur ŝoseo. Baldaŭ ili renkontis maljunulon. Ili demandis lin: "Ĉu vi scias, kie ni povas trovi Morton?"

"Ho jes," rediris la maljuna viro, "ne estas malfacile trovi Morton. Ĉu vi vidas tiun arbaron? Iru tien kaj tie vi trovos lin sub maljuna kverko."

La junuloj dankis lin kaj iris en la arbaron. Baldaŭ ili vidis larĝan kverkon kaj sub ĝi sakon. La sako estis plena de oro. La junuloj tre ĝojis kaj forgesis pri Morto. Ili pensis nur pri la oro.

"Bonege!" diris unu el ili. "Nun ni estos tre riĉaj. Ni prenu la oron en la domo de unu el ni kaj dividu ĝin je tri partoj. Ni iru! Rapide!"

"Atendu," diris alia. "Aŭskultu min. Ni ne povas porti tiom da oro en la tago. Ni renkontos multajn homojn kaj ili demandos, kion ni portas, kies oro ĝi estas. Kaj kiam ni diros, ke ni trovis ĝin en la arbaro, ili ne kredos. Ne, amikoj, nun ni ne povas iri. Ni devas atendi ĝis la nokto. Nokte, kiam estas mallume kaj la homoj dormas, ni povas porti la oron hejmen kaj dividi ĝin."

"Vi pravas," diris la tria. "Ni devas resti ĝis la nokto. Sed estas longa tempo por atendado kaj ni baldaŭ malsatos. Unu el ni iru en la urbon kaj alportu vinon kaj ion por manĝi."

Tial la plej juna iris en la urbon kaj la aliaj restis kun la ora mono sub la kverko.

Kiam la du el la tri amikoj sidis sub la kverko kaj atendis la trian, unu el ili diris: "Aŭskultu, mi ne volas dividi la oron je tri partoj. Sufiĉus dividi ĝin je du partoj. Kion vi opinias?"

"Kial ne?" diris la alia, "sed kiamaniere fari tion?"

"Ho, tio estas tre facila. Du estas pli fortaj ol unu. Kiam li revenos, ni simple mortigos lin kaj la oro estos nia!"

La plano plaĉis al la du amikoj kaj ili komencis atendi la trian.

Kaj kion faris la tria? Ankaŭ li kompreneble pensis pri la oro. "Estus bonege havi tiom da mono. Sed se ni dividus ĝin je tri partoj, restos al mi nur malmulte! Mi deziras havi ĝin nur por mi!"

Li pensis kaj pensis kaj ricevis ideon. "Mi venenos ilin!"

Li konis viron, kiu vendis venenon kontraŭ ratoj. La viro vendis al li la venenon, kaj la junulo estis revenanta al la arbaro ankoraŭ kun pano, viando kaj tri boteloj da vino.

Kiam li eliris el la urbo kaj neniu povis lin vidi, li haltis kaj metis la venenon en du botelojn. Poste li rapidis en la arbaron.

La amikoj atendis lin sub la kverko kun preparitaj tranĉiloj kaj tuĝ mortigis lin. Ili tre ĝojis, ke la tuta oro estas ilia. Ili malfermis botelojn kaj eltrinkis la vinon. Baldaŭ ili mortis ankaŭ.

Tiel la tri junuloj trovis Morton.

(M. laŭ Geoffrey Chaucer)

Antaŭ longa, longa tempo la reĝo de Danlando estis Hrothgar. Li estis brava, justa kaj afabla, kaj lia popolo lin amis. Li konstruigis grandan kaj belan palacon por si mem kaj por siaj militistoj. La homoj venadis de ĉiuj partoj de la lando por rigardi tiun elegantan palacon. Ĉiun vesperon kunvenis en la palaco multaj homoj, kaj ili manĝis, trinkis, rakontis historietojn, kantis kantojn, dancis kaj ridis.

Proksime de la palaco estis granda lago. En la lago vivis terura monstro. Lia nomo estis Grendel. Grendel aŭdis ridon kaj kantojn en la palaco ĉiun vesperon, kaj tio al li ne plaĉis. Li estis sola en la lago, kaj li tre koleras kontraŭ la militistoj, ke ili estas gajaĵ. Li kole-ris ĉiun tagon pli kaj pli.

Foje nokte Grendel eliris el sia lago kaj iris en la palacon. La palaco estis silenta kaj trankvila. Grendel eniris. En la palaco estis multaj militistoj, sed ili ĉiuj dormis. Grendel mortigis unu militiston kaj trinkis lian sangon. Poste li mortigis alian militiston kaj trinkis lian sangon. Tiun nokton la monstro mortigis tridek militistojn kaj trinkis ilian sangon. Poste li prenis la korpojn de la mortaj viroj kaj revenis en sian lagon.

La sekvan nokton Grendel venis denove en la palacon. Denove li mortigis tridek militistojn, trinkis ilian sangon kaj forportis iliajn mortajn korpojn en la lagon.

Nokton post nokto, monaton post monato, vintron post vintro la terura monstro venadis en la palacon kaj mortigadis la virojn. Neniu ridis kaj kantis plu. La plej bravaj kaj fortaj militistoj povis fari tute nenion kontraŭ li. Iliaj lancoj, sagoj kaj ĝiavoĵ ne povis mortigi Grendelon.

Tiel pasis dek du jaroj.

Sur la kontraŭa bordo de la maro estis la lando de la gitoj, antikva nacio. Inter la gitoj vivis ĵuna viro, kies nomo estis Beowulf. Li estis tre brava kaj forta. Li estis la plej forta en la tuta lando. Li estis pli forta ol tridek viroj. Foje li aŭdis pri la terura monstro Grendel, kiu en Danlando ĉiun vesperon mortigas tridek virojn. Beowulf volis helpi reĝon Hrothgar. Li trovis dek kvar fortajn, bravajn militistojn inter siaj amikoj, eniris kun ili sur ŝipon kaj ŝipis trans la maron. Ili ŝipis la tutan nokton, kaj matene ili venis al Danlando.

Kiam ili eliris el la ŝipo, ili vidis viron sur ĉevalo. Li estis unu el la militistoj de reĝo Hrothgar. "Kiu vi estas kaj kion vi faras ĉi tie?", li demandis.

"Ni estas militistoj el la lando de gitoj", respondis Beowulf. "Ni scias pri Grendel. Ni volas helpi vin batali kontraŭ la monstro."

La militisto prenis Beowulfon kaj liajn amikojn en la reĝan palacon. Reĝo Hrothgar ridetis, kiam li vidis la gitojn.

"Mi ĝojas, ke mi vidas vin kaj viajn amikojn, brava Beowulf," li diris, "sed mi devas diri al vi, ke via tasko ne estas facila. Vi devas scii, ke multaj militistoj pasigis nokton en la palaco. Ili volis mortigi la monstron, sed nun ili estas mortaj."

"Mi ne timas," diris Beowulf, "ni restos en la palaco nokte kaj atendos Grendelon. Kaj mi batalos sen lancoj, sen sagoj kaj sen glavoj, ĉar ili neniel helpus min kontraŭ li."

Venis nokto. Ĉiuj forlasis la palacon. Nur Beowulf kaj liaj amikoj restis. Beowulf diris al siaj dek kvar amikoj, ke ili kuŝu kaj dormu. Li mem atendis Grendelon en mallumo.

Grendel aperis noktmeze. Li rapide eniris en la palacon, mortigis unu el la dormantaj militistoj kaj komencis trinki lian sangon kiel ku-

time. Sed en tiu momento li ekvidis Beowulfon, kaj la terura batalo komenciĝis. Ili batalis tre longan tempon. Grendel estis tre forta, sed Beowulf estis pli forta. Li kaptis la brakon de Grendel kaj forŝiris ĝin. La monstro hurlis kaj kuris for el la palaco. Li kuris reen en sian lagon kaj mortis tie.

Matene reĝo Hrothgar kaj liaj viroj venis en la palacon. Kun granda surprizo ili rigardis la brakon de Grendel, kiu pendis de sur plafono en la mezo de la palaco. Poste ili iris al la lago. La akvo estis ruĝa de la sango de Grendel.

La popolo el la tuta lando venis por vidi Beowulfon kaj danki lin. Ĉiuj estis feliĉaj. Longe ĝis malfrua nokto ili babilis, kantis kaj ridis en la palaco kiel antaŭ tempo.

Nokte ĉiuj iris dormi. Sed la suferoj de Hrothgar kaj de liaj viroj ankoraŭ ne finiĝis. Malica sorĉistino eliris el la lago kaj kuris en la palacon. Ŝi estis patrino de Grendel. Ŝi kuris en la palacon, mortigis unu militiston kaj forportis lian korpon en la lagon.

"Mi petas, ke vi helpu min ankoraŭ unufoje, brava Beowulf," diris la reĝo.

"Mi helpos vin kun plezuro, reĝo Hrothgar," respondis Beowulf. "Ni tuĝu iru al la lago. Mi mortigos la sorĉistinon."

Ili eksidis sur siajn ŝevalojn kaj rajdis al la lago. Atinginte ĝin, ili vidis, ke la lago ne estas kvieta, kaj ke la akvo estas nigra. Ili atendis. Estis malvarme kaj mallume. La sorĉistino ne aperis. La militistoj ne sciis kion fari. Tiam Beowulf iris malsupren de la ŝevalo kaj saltis en la lagon.


Kiam liaj piedoj atingis la fundon, la sorĉistino saltis sur lin kaj volis mortigi lin, sed ŝi ne povis. Poste Beowulf vidis la kavernon de la sorĉistino kaj kuris en ĝin. Tie li estis tre surprizita. En la kaverno ne estis akvo. En la mezo de la planko brulis fajro. En la lumo de la fajro Beowulf vidis magian glavon sur la muro. Li prenis ĝin kaj mortigis per ĝi la sorĉistinon.

En tiu momento aperis la suno super lia kapo kaj li vidis en angulo la mortan korpon de Grendel.

Beowulf prenis la magian glavon kaj eliris kun ĝi el la akvo. Liaj amikoj tre ĝojis, kiam ili vidis lin viva.

En la palaco Beowulf rakontis al reĝo Hrothgar kaj al liaj militistoj pri sia batalo kun la sorĉistino. Reĝo Hrothgar dankis Beowulfon multfoje kaj donis al li kaj al liaj amikoj multajn riĉajn donacojn. Kiam Beowulf kun siaj viroj eniris sur sian ŝipon, multaj homoj venis por adiaŭi ilin kaj danki denove kaj denove.

MM (antikva legendo)



Jan Neruda

Preĝo

(trad. M. Lukáš)

Ho Dio, donu gloron al Johano,
Karolon benu per konstata saĝo,
al Aleksandro donu bonhumoro,
Ĝojigu via Ĝiopova mano
per mono Teodoron kaj Viktoron,
kaj Ferdinandon per edzino bela,
modela kaj neniam malfidela
kaj al Jozefo donu grandan saĝon
kaj al Antono la plej longan aĝon,
kaj, ĉar mi preĝis tiel bon-intence,
al mi la sumon donu rekompence!



NOVINOVÉ DOPLATNÉ

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poplatek povolen

Ředitelstvím pošt Praha

j. zn. P/1-1267/79 ze dne 6.4.1979

Ĉeĥa Esperanto - Asocio
ĈESKÝ ESPERANTSKÝ SVAZ
JILSKÁ 10, 110 01 PRAHA 1
telefon 220 262

400 00

OB

M

spere
SPER